

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advok., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gili Norita, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 185
30. 3. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fr., por landoj, kies valuto
suficis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo

po kvadratal-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fr. (Ĝo antaŭa pago 0,15 sv. fr.),
en „Internacia Komerco“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Grava dekreto pri Esperanto en Germana Respubliko.

Jam aliĝis 2000 kongresanoj por la Deksesa.

Brita kaj Franca Kongresoj je Pentekosto. — Antaŭkongresoj en Dresden kaj Torino.

Grava dekreto pri Esp. en Germana Respubliko.

De l' direktoro de la Esperanto Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig ni ricevis la informon, ke la Prusa Ministro por Scienco, Arto kaj Popolklerigado la 10 marto publikigis la sekvan dekreton:

Prusa Ministro por Scienco,
Arto kaj Popolklerigado
LTK 855 U II.1.

Berlin, 10 marto 1924.

La enketo farita sekve de mia dekreto de l' 20 majo 1923 — LTK 85 — rezultigis, ke granda nombro da instruistoj kaj instruistinoj estas kapablaj kaj pretaj, instrui la internacian helplingvon Esperanto. Per tio ekzistas la ebleco peradi al la lernantoj kaj lernantinoj la scion de tiu ĉi lingvo. Estas ja maleble, enigi la instruadon kiel libervolan instru-fakon en la instruoplanojn; specialaj rimedoj ankaŭ ne povas esti disponigataj de mi. Mi jamen ordonas, ĉie, kie instruistoj deklaras sin pretaj instrui sen speciala kompensa ekster la programo de l' cetera instruado, aŭ kie la necesaj rimedoj povas esti havigataj alimaniere, instigi, ke konvencitaj klasĉambroj estu disponigataj kaj la instruado estu ĉiutlute akcelata.

Se en tiu lernejo ne ekzistas instruisto, kapabla pri tiu ĉi instruado, nenio kontraŭstaras, ke la lernantoj de tiu ĉi lernejo provizore partoprenu al la koncerna instruado en alia konvene lokita lernejo.

Tiu ĉi dekreto devas baldaŭ esti diskonigata al la instruistaro de ĉiuj pli altaj lernejoj de l' tuta administra regiono. En tiuj lernejoj, en kiuj la instruado estas ebla, tiu ĉi dekreto devas ankaŭ esti diskonigata al la gepatra konsultantaro. Ĉiutokaze devas esti obligate al la instruistaro, preta preni sur sin la instruadon, klarigi al la gepatroj la esencan de Esperanto kaj ĝian signifon. En tio devas esti speciale akcentate, ke per lernado de tiu ĉi lingvo la studo de vivantaj lingvoj neniel estu repusata, sed kontraste per tio estu akcelata.

Mi ordonas, raportu al mi ĝis la 1 febr. 1925 pri la spertoj ĝis tiam faritaj, precipe pri la partoprenado al tiu ĉi instruado.

Subskribo: Boelitz.

Al la Provincaj instru-direktoroj en Königsberg, Berlin, Stettin, Breslau, Magdeburg, Schleswig, Hannover, Münster, Kassel, Koblenz.

Tiu ĉi grava dekreto de l' prusa ministro kaj valida por ĉiuj prusaj provincoj de la germana respubliko sekvas al similaj jam antaŭ kelka tempo faritaj dekretoj de altaj ministroj en la federaciaj ŝtatoj germanaj Heslando, Brunsvigo, Saksujo. Ni ne dubas, ke ankaŭ ĝi havos gravajn sekvojn. Antaŭ ĉio ni kredas, ke la komisionoj de la Esperanto Instituto por la Germana Respubliko iniciatos utiligon de la valora dekreto. Ni rekomendas al niaj germanaj legantoj, precipe al la kompetentaj instruistoj, turni sin por eventualaj aranĝoj al la direktoro de la germana instituto s-o Prof. Dietterle, Leipzig-Schl., Seumstrasse 10.

Diskonigo de la dekreto en la germana kaj la eksterlanda gazetaro estas nepre rekomendata.

XVI-a Univ. Kongreso de Esperanto en Wien

6 ĝis 14 aŭgusto 1924.

Tria bulteno.

La ĝis hodiaŭ aliĝinta kongresano, la unuaj du miloj, jam havas vere internacian aspekton. Alvenis aliĝiloj el Afriko Suda, Alĝerio, Anglujo, Aŭstrio, Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Danzig, Estonio, Francujo, Germanujo, Grekujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Jugoslavio, Latvio, Litovio, Nederlando, Polujo, Rumanujo, Rusujo, Skotlando, Svedujo, Svislando, Usono.

Konsiderante la fakton, ke malproksimaj landoj ricevis la invitilon de la XVI-a tre malfrue, la L. K. K. decidis, ke la kotizo ne estu altigota jam la 31 marto, sed por aliĝoj alvenantaj post la 31 majo.

La L. K. K. decidis prezenti al la kongresanoj kiel festatrazojn ne sentimentalan, sed gajigan, vere laŭripe wienan sorĉfabelon: Raimund, Der Verschwender (La malŝparulo), tradukita de Kolonelo Zwach, Wien. La aktoraro nuntempe ekzercadas la esperantan lingvon. Tekstlibro tre baldaŭ estos eldonata de Hirri & Sohn, Leipzig.

Nun preparata ĉefbulteno, eldonota komence de aprilo, raportos detale pri la tuta kongresa programo. Ĝi estos forsendata kun la kongreskarto al ĉiuj aliĝintoj kaj al intereso. Kompleta listo de fakkonferencoj kun adresoj de aranĝantoj ankaŭ estos publikigata en la ĉefbulteno. Krom tio la ĉefbulteno enhavos raportojn pri projektata ekspozicio kaj naciaj informoj, ankaŭ pri Esperanto-ekzamenoj dum la kongreso, postulataj de aliĝintoj el diversaj landoj.

La Esperantistaj Societoj en Wien per la Esp.-delegiataro aranĝis specialajn ekzercadojn por gvidantoj, perfektigante ilin por ĉiuj eblaj taskoj en la granda urbo kun amaso da vidindaĵoj kaj en la belega ĉirkaŭaĵo, por kontentigi la kongresgastojn.

La L. K. K. denove petas sendi la aliĝilojn kiel eble plej frue por plifaciligi la laboron al la kongresa oficejo, kaj sendas al ĉiuj helpemaj samideanoj korajn salutojn kaj dankon.

Loka Kongresa Komitato
Schade, ĉefsekr.

Al la Esperantistoj-Akademianoj de ĉiuj landoj!

La praktika uzado de Esperanto pli kaj pli disvastiĝas kaj akiras jam sufiĉe grandan gravecon. Pro tio ankaŭ la akademianoj estas devigataj pli serioze sin okupi pri Esperanto uzota en diversaj partoj de scienco.

La XVI-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Wien inter la 6—14 aŭgusto 1924, donas al la scienculoj de la tuta mondo, — kiuj jam praktike elprovis ĉiun uzadeblecon de Esperanto kaj fial ŝatas ĝian valoron kiel unua fremda, ĝenerale uzota lingvo, — la plej bonan okazon, amike preparoli diversajn sciencajn fakajn aferojn.

La esperantistojn kaj la Esperanto-amikojn inter la Akademianojn de ĉiuj landoj per tiu ĉi alvoko ni afable invitas partopreni la konferencojn dum la XVI-a, preparotajn de la subskribintoj. Laŭnecese oni aranĝos historian, filologian, matematikan, juristan, medicinan, teknikan k. a. grupojn. La studentoj de alilernoj ankaŭ havas apartajn konferencojn.

Vi, alŝatataj samideanoj, invitataj al la Deksesa, certe tre bone komprenas la gravecon de tiu ĉi alvoko kaj invito. Ni montris denove la plenan taŭgecon de Esperanto por ĉiuj fakaj raportoj kaj por la multvalora simpligo de la tutmondaj interrilatoj. Samtempe ni helpas efike al samcelanoj ĉiulandaj per niaj unuigitaj fortoj, por atingi la celon, kiun nia majstro al ni montris kaj al kiu ni ĉiuj spiras.

La invitantoj esperas, ke ili dum la kongresaj tagoj havos la ĝojan amike saluti multajn alŝatatajn akademianojn pionirojn por Esperanto kaj

petas, sendi tre baldaŭ, eble tuj, sciigojn, proponojn kaj aliĝojn al la adreso: Esperanto-Kongreso (Akademia Konferenco), Wien, Aŭstrio.

Wien, la 25 februaro 1924.

* * *

La Esperantistoj-Akademianoj en Aŭstrio:

Aspang: Adolf Krehan, mag. farm. — Bad Ischl: Dr. Friedr. Zeiner, ministeria konsilisto — Geras: P. Raynald Schmalbaug, pastro — Graz: Prof. Herm. Bergmeister, Dr. med. Wilh. Diel, supera stabkuracisto — Dr. jur. Heinz Fiby, banksekr. — Dr. jur. Adolf Halbedl, Dr. M. J. Metzger, Dr. med. Paul Myrdacz, gen.-stabkuracisto, Dr. jur. Franz Neuer, kortega konsilanto, Ekskelenco Dr. Aug. v. Pirreisch, prez. de supera landa juĝejo, Dr. jur. Ernst Swoboda, konsilanto de supera landa juĝejo, Josef Wagner, mag. farm. — Innsbruck: Franz Egger, Prof. de reallernejo, Dr. med. A. Papsch, dentkuracisto — Klosterneuburg: Dr. med. Hans Koritzschoner, kuracisto — Krems: P. Franz Meštan, sol. piar. — Liesing: Dr. med. Adolf Linerth, med. konsilanto, Dr. Franz Scholz, eksa landdeputito — Linz: Dr. Franz Jetzinger, redaktoro, Dr. Wirth, polica supera komisaristo — Mödling: Dr. fil. Jos. Longo, Prof. — Neubau Kreuzstetten: ing. Jakob Dietrich — Pöschlarn: P. Joh. Wismüller, kuracisto — Rattenberg: Dr. jur. Leo Blaas, juĝisto, Hans Dafner, konsilanto de supera landa juĝejo, Dr. med. Max Hintner, urbkuracisto, Dr. jur. Rudolf Zangerle, not.-kandidato — Retz: P. Ludwig Koller, paroĥestro — Rosenau: P. Johann Galxner, paroĥestro — Salzburg: Hermann Hinterhuber, mag. farm., Dr. teol. Franz Christianell, Prof. — Steinach: Teodor Fuchs, kortega konsilanto, eksprof. univ. — Wien: Dr. jur. Franz Auer, konsilanto de supera landa juĝejo, Rud. Baar, prof., Leopold Buchsbaum, supera polica komisaristo, Dr. Josef Norbert Dörr, inst. sekr., Dr. Oskar Dressler, kortega konsilanto, Dr. Barono Egon von Eickstedt — Dr. med. Albert Engler, Dr. jur. Richard Engler, Dr. Bernhard Ganzel, prof., Dr. Viktor Graf, univ. prof., Ferdinand Hartwich, kortega konsilanto, ing. Adolf Fr. Hess, kortega konsilanto, Prof. Dr. fil. Rudolf Hiller, Dr. jur. August Hloucha, Dr. Emil Horner, Prof., Dr. fil. Hugo Joki, Prof., August Jungwirth, ekskortega konsilanto, dir. Rud. Kaftan, Dr. Josef Kraus, kortega konsilanto, Prof. Dr. Ernst Mayrleb, min. konsilanto, Dr. jur. kaj fil. Arnold Minibek, ministeria konsilanto, P. Wolfgang Nedwid, urbedano, Johann Pawlowsky, registara konsilanto, Dr. Robert Pick, Prof., Dr. Karl Raderschofsky, Prof., Dr. Karl Reishofer, Prof., Dr. ing. Hans Romanovicz, Prof., Dr. jur. Edmund Schlesinger, advokato, Johann Schröder, redaktoro, Dr. Richard Schumann, kortega konsilanto, Prof. Ludwig Siedl, mag. vicinspekt., Emil Sinek, ingen., Prof. Otto Simon, urblerneja konsilanto, Dr. fil. Hugo Sirk, docento, Dr. med. Edmund Sós, dentkuracisto, Dr. Robert Suessmuth, Prof., Alexander Taussig, mag. farm., Dr. Moritz Topolansky, inst. sekr., Dr. Rudolf Ungar, Prof., Dr. Anton Walka, supera financkonsilanto, Dr. Franz Wolmann, kortega konsilanto, M. Wortmann, ĝen.-sekr., Dr. fil. Tomi Wortmann.

15-a Brita Esperantista Kongreso en Chester je Pentekosto (6—10 junio) 1924.

La kongreso havos lokon en unu el la plej antikvaj urboj en Britujo. Lokita en la nord-okcidenta parto de Anglujo, ĝi formas la naturan alirejon al Nord-Kimrujo kaj Irlando. Jam en la jaro 47 la romanoj havis sian garnizonon tie, kaj, ĉirkaŭ la malnova urbo, ili konstruis grandan muron, kiu postrestas ĝis hodiaŭ. Ĉe tiu militista sidejo okazis multaj historiaj bataloj, kaj, krom la konfliktoj de tiuj fruaj tagoj, okazis ankaŭ sieĝoj inter reĝaj soldatoj kaj parlamentaj soldatoj en la tagoj de Karlo I. Estas multo vizitinda en la urbo, kaj kongresanoj certe lernos kaj vivos interesajn historiajn aferojn.

La kongresa prezidanto estas nia konata samideano Prof. Collinson (Liverpoola universitato), kaj bonvenigos la vizitontojn al la urbestro. Inter la patronoj estas Lia Reĝa Moŝto La Duko de Connaught, eminentaj ekleziaj, edukistoj, prezidantoj de komercaj ĉambroj ktp.

Krom la bonveniga propaganda kunveno, jara kunveno de BEA, okazos ankaŭ ekskurso al Llangollen, fama valo en Kimrujo, kaj poste balo. La lokaj samideanaj organizoj vizitojn en la urbo mem. Interesatoj sin turnu al la sekretario **A. Hogg**, 25 Bradford Street, Handbridge, Chester.

Franca Esperantista Nacia Kongreso 1924 je Pentekosto.

La mond fama kaj belega urbo **Strasbourg** havos la honoron, dum la nunjara **Pentekosto** ricevi en siaj muroj la francajn esperantistojn kaj krome eble ankaŭ multajn eksterlandajn samideanojn. La urbo Strasbourg invitas per la favoraj sinjoroj **J. Peirotes**, urbestro, kaj **F. Oesinger**, advokato kaj prezidanto de la Societo por Homrajtoj en Orientfranco, la nomitan Francan Esperantistan Kongreson. La esperantistaj delegitoj estos akceptitaj de la urbo en la urbĉambroj.

Jam de nun la kongreskomitato faras siajn plej grandajn klopodojn por aranĝi sukcesitan kongreson. Sed krome la kongreskomitato esperas, ke ĉiuj esperantistoj, ne nur francaj, sed ankaŭ eksterlandaj gesamideanoj, helpos al la sukceso de la kongreso. Tial venu multnombre al Strasbourg por viziti la kongreson dum Pentekosto! Montru, ironie al Strasbourg, al ĉiuj neesperantistaj francoj, kiom forta jam estas nia movado! Kaj se vi ne povas partopreni la kongreson, helpu al ni per mensondajto aŭ acetu niajn glumarkojn, montrante la ĉiekonatan katedralon. Ili estas vendataj por 2 fr. fk. po cento. Por sciigi pri detaloj oni turnu sin pri financaj aferoj al la kongreskasisto **s-o Antono Schwartz**, 15, rue du Marché Foch, **Strasbourg**, pri propagandaj kaj aliaj aferoj al **s-o Henriko Hotz**, 47 Boite commerciale, **Strasbourg**.

IX. Itala Kongreso de Esperanto en Torino kaj Antaŭkongreso al la Deksesa.

La dato. La Itala Kongreso malfermiĝos la 2^a aŭgusto vespere kaj fermiĝos la 5 aŭgusto, ĝustatempe por la komenco de la Deksesa. Dim. 3 aŭgusto oni faros grandan oficialan kaj publikan malfermon de la Kongreso. Ĉefa tasko de la aliaj tagoj estos laboro per Esperanto en ĝenerala kaj fakaj kunidoj kaj amuzoj. Ĝis nun estas fiksataj laborkunvenoj pri UEA, la Itala Esperanta Federacio, 1. Nacia Asocio inter la Esperantistoj-Fervojistoj, la Itala Katedro de Esperanto de la teknikistaj esperantistoj. Aliaj esperantaj asocioj baldaŭ aliĝos.

La Honora Komitato. La prezidanto de la Honora Komitato estas **L. M. la Grafo Teofilo Rossi**, ŝtata ministro kaj senatoro, kiu de longa tempo tre favoras la esperantan movadon.

La Direkta Konsilantaro. La Direkta Konsilantaro estas: prez. **s-o ing. Marcello De Balzac**, del. de UEA, ano de la Itala Katedro de Esperanto, prez. de la **Torina Esp. Asocio**; vicprez. **s-o George Osborn Grawley**, vicprez. de la **Torina Esp. Asocio**; sekr. **s-o ing. Mario Muretti**, vicsekr. **f-lino Rina Actis**, **s-o Adv. Raoul Monti**, **s-o Kav. Maj. Berardo Sacconi**; kas. **s-o Aleviano Bisetti**; del. de la **FEI**: **s-o Franco Ramolfo**, del. de **FEI** en Torino; del. de la **Fervojista Itala Unio**: **s-o Franco Ramolfo**; kontrevizoroj **s-o Luigi Razzetti**, **f-lino Adele Albano**.

Etiko de l' beleco.

Laŭ **D-o Richard N. Coudenhove-Kalergi**. Esperantigita de **D-o Sós**, Wien.

Il. (Daŭrigo kaj fino.)

3. Beleco de la animo.

- La kalokagatias postulas:
- En sahan korpon sanan animon!
 - En fortan korpon fortan animon!
 - En puran korpon puran animon!
 - En belan korpon belan animon!

Ĝi postulas la kompletigon de korpokulturo per konvena animumkulturo.

Antaŭ 150 jaroj oni ankoraŭ malmulte sciis pri korpokulturo: higieno estis nekoniata, gimnastiko estis nekoniata, same kiel valoro kaj esenco de pureco. De tiu tempo la eŭropa korpokulturo faris gravan progreson. Dume la tuta kortegano de Ludoviko XIV. estis ankoraŭ nelavita, la moderna „gentleman“ konsideras memkompreneble purigi sin ĉiutage.

Same kiel ĉi tiu volo al korpa pureco, unufoje vekita, konstante plivasiĝas kaj ĝeneraliga per si mem, sen ŝtataj aŭ religiaj sankcioj — tiel ankaŭ la inklino al anima pureco iam povus fariĝi ĝenerala.

La mondpercepto de la dudeka jarcento, kiu venkis la materialismon de la dekadna, retrovis la perdintan animon. El ĉi tiu hipotezo estas konkludita la praktika konsekvenco, direkti al la animo la saman zorgon, kiel al la korpo.

El ĉi tio rezultas la misio de la etiko en nia senreligia epoko. Ĉi tiu misio de la etiko estas: higieno, gimnastiko kaj kosmetiko de la animo, gardi pri saneco, forto kaj beleco de la animo.

Etiko kiel higieno de la animo pretrekas la percepton, ke la homa naturo elorigine estas bona. Ĉi tiu idola naturo percepto estas en akra kontrasto al la kristana doktrino pri la pepraco. Dume la kristanismo postulas la neigon de nia naturo, la antikva kaj moderna idolanismo postulas la evoluigon kaj plibeligon de nia animo. La greka postulo pri la naturo vivo estas identa kun la konfucia percepto, ke la leono en homo estas naturo, la mal-

La kotizaĵo estas fiksita por kongresanoj je liroj 15.00, antaŭkongresanoj je liroj 10.00, familianoj je liroj 5.00.

Adreso de l' kongreso: **ing. Mario Muretti**, **Piazza Carlo Felice 12**, Torino.

Invito.

La vojo al Wien, la urbo de la XVI-a, kundukas por multaj kongresanoj el la nordo kaj oriento de Eŭropo tra **Dresden**, la urbo de la neforgesebla Kvara. Multaj el la kongresantoj, konantaj Dresdenon de antaŭaj vizitoj, intermpos tie sian vojaĝon por renovigi siajn impresojn por tiu ĉi bela urbo, aliaj haltos tie por konatiĝi kun la belajoj de la sakslanda metropolo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ĉiuj volonte renkontos tie malnovajn kaj novajn samideanojn. Por tion ebligis, la **Dresdena Esperantistaro** aranĝos en la tagoj antaŭ la **Deksesa en Dresden**.

Antaŭkongresan Renkontigon

kaj kore invitas ĉiujn travojaĝontajn kongresanojn al tiu ĉi tute senĝena aranĝo. Ni ne projektas lacigan antaŭkongreson kun grandaj kunvenoj kaj festoj en varmegaj ĉambroj — male ni volas dati la eblecon, en agrabla kunesto kun samideanoj ripozi dum unu aŭ du tagoj en nia urbo, tamen ebligante al ĉiu, kiu tion ŝatas, la ĝuon de la vidindaĵoj de Dresden kaj ĉirkaŭaĵo sub sperta gvidado. Por fakuloj la ĉi-jara **Dresdena ekspozicio pri „Germanaj Tekstoj“** estas speciala allogaĵo.

Detaloj sekvos. Ni petas antaŭanoncojn de la samideanoj, kiuj intencas, sekvi nian inviton, por ke ni povu taksii la nombron de la partoprenantoj kaj laŭ ĝi fari niajn aranĝojn.

Venu al Dresden! Koran bonvenon!

Por UEA-regiono de Dresden por GEA, loka unuigo Dresden **Joh. Karsch**, komitatano **Joh. Engst**, prezidanto.

Avizojn kaj demandojn oni direktu al nia oficejo Dresden-A 1, Struvestrasse 40.

Konstanta Rerezentantaro de la Naciaj Societoj

konsistanta el unu reprezentanto de ĉiu nacia societo esperantista.

(Starigita laŭ decido de la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto — Helsinki 1922.)

Proponata Sidejo:
Esperantista Centra Oficejo
51 rue de Clichy
Paris (9), Francujo.

Honorprezidanto:
Generalo H. Sebert.

Prezidanto:
S-o John Merchant
(Sheffield, Anglujo).

Sekretario-Kasisto:
S-o Charles H. Edmonds.

Adreso de la Sekretario-Kasisto:
21 Russellcroft Road,
Welwyn Garden City, Anglujo.

Al la Prezidanto de la Nacia Societo Esperantista. 1 marto 1924.

Dua cirkulero.

Estimata Sinjoro Prezidanto.

(7) — Rilatas al 2 kaj 3. — Sekve de nia cirkulero de 14 novembro 1923, la jenaj societoj aprobis la elekton de estraro de K.R. farita en Nürnberg kaj konfirmis la elekton de Centra Komitato laŭ la listo samtempe starigita: —

Svisa Esperanta Societo, Brita Esperantista Asocio, Pola Esperantista Asocio, Esperanto Asocio de Finnlando, Centra Dana Esperantista Ligo, Itala Esperantista Federacio, Hungarlanda Esperanto Societo, Germana Esperanto-Asocio,

Kataluna Esperantista Federacio, Belga Ligo Esperantista, Brazilia Ligo Esperantista, Nederlanda Societo Esperantista „La estonto estas nia“, Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakio, Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Riga Esperanta Societo, Gejunulara Esperanto Ligo en Bulgarujo, Aŭstruja Esperanto Delegitaro, Esperanto Asocio de Estonio, Aŭstralazia Esperanta Asocio. (19 societoj entute).

La japana kaj kalifornia societoj, ne uzinte la demandon disidentan, ne respondis pri tiuj punktoj. Tamen, ĉio nun estas en ordo, kaj tiel la Centra Komitato kaj la estraro de K.R. povas labori sen plua demando pri rajtigo.

(8) — Rilatas al 4. — Kelkaj naciaj societoj ĝis nun ne respondis al nia peto, ke oni sendu senprokraste kotizaĵojn por 1923. La respondo ricevitaj estas la jenaj:

Por jaro 1923:

Jam pagitaj:	membroj
Svisa E.S.	sv. fk. 100.— 350
Brita E.A.	£ 30 1200
Pola E.S.	pol. mk. 50000.— 100
E.S. de Finnlando	f. mk. 250.80 228
C. Dana E.L.	d. kr. 114.50 225
Itala E.F.	liroj 100.— 800
Brazilia L.E.	fr. fk. 200.— 210
Kalifornia E.A.	USA dol. 4.— 40
Aŭstralazia E.A.	£ 22s.Op. 172

Baldaŭ pagotaj

Nederlanda S.E	guldenoj 75.— 300	membroj
Germana E.L. en Ĉs.	ĉ. kr. 100.— 1000	"
Ĉeĥoslovaka A.S.	ĉ. kr. 500.— 800	"
G.E.L. en Bulgario	levoj 500.— 500	"
Aŭstruja E.D.	kr. 60000.— 56	rondoj
E.S. de Estonio	e. mk. 800.— 400	membroj
Belga L.E.	b. fk. 100.— 400	"

Por jaro 1924:

Jam pagitaj:

Japana E.I. fr. fk. 665.60 ? membroj

Pagotaj pli poste: —

Germana E.A. esperas pagi fk. 0.25 po membro 3800 membroj

Kataluna E.F. pagos pes-tojn. 0.50 po membro 300 membroj

Hungarlanda E.S. pagos ĝis nun ne difinitan sumon.

Riga E.S. pagis latojn 10.— al Centra Komitato por 1923, sed pagos al K.R. por 1924 ĝis nun ne difinitan sumon.

Ni insiste petas, ke la naciaj societoj, kiuj ne respondis, tuj sendu al ni respondojn al la demandoj en nia unua cirkulero, kaj precipe ke ili sendu la kotizaĵojn por 1923.

(9) — Rilatas al 5. — La reprezentantoj de la respondintaj societoj estas:

Svisa E.S. — D-o Edmond Privat; Brita E.A. — S-o M. C. Butler; Pola E.S. — Jan Kostecy; E.A. de Finnlando — S-o Albin Sandström; C. Dana E.L. — S-o Martin Blicher; Itala E.F. — Adv. A. Vaona; Kalifornia E.A. — S-o A.S. Vinzent; Brazilia L.E. — D-o Joao B. de Mello Souza; Nederlanda S.E. — S-o Ing. J.R.F. Isbrücker; Germana E.L. en Ĉs. — Prof. Ing. G. Scholze; Belga E.L. — S-o Franz Schoofs; Ĉeĥoslovaka A.E. — Prof. D-o fil. Stan Kamaryt; G.E.L. en Bulgario — S-o Lazar Trifonov; Aŭstruja E.D. — S-o Franz T. Schade; Hungarlanda E.S. — D-o Jozefo Takocs; Germana E.A. — D-o H. Arnold; Kataluna E.F. — S-o Joan Amades; Riga E.S. — S-o Talivaldo Indra; Aŭstralazia E.A. — S-o Cedric F. White.

bono malsaneca, kiel ankaŭ kun la vortoj de Goethe: „Kion ni en la homa naturo nomas malbono, tio estas nur mankava kaj malperfekta evoluo, kriplajo aŭ malbonformigo — pli manko aŭ superfluo de morala kvalito ol la pozitiva malbono.“

Laŭ ĉi tiu sencio konsideras la moderna scienco multajn krimojn kiel patologiajn fenomenojn, kiel malsanulojn; en ĉi tiu sencio oni parolas pri „moral insanity“ (morala malsaneco) — morala frenezeco. Laŭ ĉi tiu sencio ĉi estas pli frue konsiderita kaj punita kiel malvitaĵo, nuntempe estas kuracata kiel malsano kaj resanigata per psikoanalizo. Ne estas iam malproksime la tempo, en kiu ĉiuj moralaj defektoj estos deklaritaj kiel patologiaj emocioj, kiel jam nun kleptomano, patologia mensogo aŭ patologia avarco. Tiam la kompreno kaj flegado de la anima saneco fariĝos same ĝenerala kiel la kompreno kaj flegado de l' korpa saneco. Tiam oni instruos moralon, anstataŭ prediki ĝin.

La dua tasko de senreligia etiko estas: gimnastiko de la animo. Same kiel la korpa gimnastiko konservas la korpon forta kaj malrigida — same la anima gimnastiko konservu la animon forta kaj malrigida. Ambaŭ formoj de gimnastiko radikas en la ekono, ke ĉiu organo kaj ĉiu funkcio devas esti ekzerkata, por konservi sian streĉforton. Tial ĉiu morala ago estas impulso al fortigo de la animo, al pilgrandigo de ĝia kuraĝo, al pliperfektigo de ĝia justecemo, aŭ al pliligrandigo de ĝia amkapablo; neniu ago, nek bona nek malbona, nek nobla nek fia, preterpasas la animon sen impresoj: ĉiamaniere la animo fariĝas produkto de siaj agoj.

En tio kuŝas la signifo de askezo. Askezo estas la greka treduko de l' angla vorto „training“ (memdedukado). Askezo estas dresado de la animo. Same kiel fizikaj agoj de plej alta grado estas akriblaj nur per „training“, tiel psikaj agoj de plej alta grado estas akriblaj nur per askezo. Ĝi aligas la animon al grandeco en ago kaj rezistopovo. Nur kiu juĝante lernis memvole rezigni pri siaj deziroj, nur tiu akiras la forton al vera libereco, la forton al ideala vivo, dume dorlotita volo frue kadukiĝas.

La tria tasko de senreligia etiko estas: kosmetiko de la animo, konservi la animon pura kaj bela. La be-

zono al anima beleco kaj pureco devas fariĝi same forta, kiel la bezono al korpa beleco kaj pureco. La homoj devas ekoni, ke noblanimeco estas identa kun interna beleco — vulgareco identa kun interna malbeleco. Ke estetiko kaj etiko laŭ sia senco estas identaj, kaj nur laŭ sia objekto diferencas: ĉar estetiko estas la doktrino pri la belo ĉirkaŭ ni — etiko la doktrino pri la belo en ni.

La instigilo al kosmetiko estas: ĉe knaboj la plifortigo de honorosento — ĉe knabinoj de hontosento.

Sed por fariĝi fonto de moralo, la honoro devas esti sendependa de l' sorto. Nova homohonoro devas anstataŭ la feŭdan rabishonoron kaj la burĝan marĉandistan honoron. Ĉar nuntempe rezas erarkomprenoj pri honoro kaj malhonoro. Se plifortulo validas malhonorigita — dume efektive la plifortulo makulis sian honoron. Tiel la feŭda tradicio starigis surkepe la honoreidon. Kiel arĥimedean punkton de estonta honoreido oni povas starigi la ekkonon, ke neniu en la mondo povas rabi mian honoron, escepte mi mem per malbona ago; ke mia honoro ne dependas de tio kion mi suferas, sed de tio kion mi faras.

Same kiel ĉiu knabo volas esti honorulo — tiel ĉiu knabino esti belulino. Beleco estas celo por si mem. La amo al beleco povas fariĝi la plej firma fundamento de la estonta etiko. Viro kaj saĝeco estas la plej daŭra kosmetiko ekzistanta. Neniu vizaĝo povas esti tiel malbela, ke ĝi ne povas beliĝi per animo — kaj spiritplena fizionomio. Kaj neniu vizaĝo povas esti tiel bela, ke ĝi ne malbeliĝos per malbona fizionomio. Ĉi tiu eksteren brilanta interna beleco kreskas nur jaroj, dume la pure materia beleco en la sama tempo malpliiĝas; tial ne ekzistas pli certa beligilo ol grandaj, puraj kaj noblaj pensoj, sentoj kaj agoj.

Kiam la homoj tute komprenos la estetikajn karakterojn de l' kontrasto inter noblo kaj malnoblo, tiam ili klopodos el si mem agi noble: ĉar neniu volas esti malbela, sed bela. Same kiel ĉiu sin ĉirĉtaŭas pli volonte per belaj objektoj ol per malbelaj, tiel la homoj pli volonte evoluigos siajn belajn karakterojn ol la malbelajn. Kaj al la demando, kial ili agas noble, ili respondos: ĉar tio estas bela!

(10) — Rilatas al 6. — La estraro de K.R. diskutis kun la Centra Komitato diversajn planojn pri konferenco, sed por pluraj malhelpoj la aranĝoj devis iom ŝanĝigi de tempo al tempo. Fine, tamen, oni decidis kunvoki al Genève por la 20 aprilo, tuj post Pasko:

(a) Komunan kunvenon de K.R. kaj UEA (elektantoj de C.K.) por diskuti la sekvoj de la kontrakto de Helsinki, precipe rilate al rimedoj por pli infima kunlaborado inter UEA kaj la naciaj societoj, kun la celo prepari raporton por la Kongreso de Vien pri la necesaj paŝoj farotaj.

(b) Konferencon de Naciaj Societoj, laŭ deziro de la Komitato de britaj komercistoj kaj komercaj organizaĵoj starigita sekve de la Konferenco de Venezia, por aranĝi detalojn pri eksperimento instruado de Esperanto al diverslandaj komercistoj.

(c) Kunvenon de K.R. por diskuti en prepara maniero pri diversaj internaj aferoj, ekzemple bazo de kotizoj, voĉdonsistemo, financa jaro, ktp. La kunveno celas prepari raporton por dissendo al ĉiuj naciaj societoj por ke en Vien oni faru efektiviĝajn decidojn.

(d) Samtempe UEA profitigos la okazon por kunvoki sian Komercan Komisionon kaj ankaŭ siajn komitatojn, delegitojn kaj subtenantajn membrojn por eksterordinara kunveno pri la aplikoj de la rekomendoj de Venezia koncernantaj la servojn de UEA kaj pri la necesaj rimedoj por plifortigi la Asocion.

Kiu intencas partopreni bonvole tuj informu la Centran Oficejon de UEA en Genève. Tiu Oficejo prizorgos detalojn pri loĝado ktp.

Ci tiun cirkuleron ni sendas al la prezidantoj de la naciaj societoj kaj ni samtempe sendas kopion al ĉiuj jam nomita reprezentanto.

Ni petas, s-o prezidanto, ke vi afable tuj sciigu al s-o Edmonds, la sekretario-kasisto de K.R., la nomon de la membro kiu reprezentos vin en la kunvenoj en Genève.

Akceptu, kara samideano, niajn sincerajn salutojn kaj bondezirojn.

John Merchant, Prezidanto. Charles H. Edmonds, Sekretario-Kasisto.

IV-a Sat-Kongreso en Bruxelles.

La IV-a Kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda (SAT) okazos de 14—18 aŭgusto 1924 en Bruxelles. Pliaj informoj sekvos.

Ci nian intencas organizi grandan ekspozicion de ĉiuspecaj esperantistoj dum la kongresotagoj, ni petas, ke oni sendu ĉiuspecajn publikigaĵojn al s-o van Aelst, 24, rue de Sévigné, Anderlecht, Belgio. Anticipan dankon al ĉiuj helpemaj samideanoj.

IV-a Satkongresa Komitato.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciligi (sur postkarto aŭ aparta folieto unufolte skribita, sed ne inter administraciis aŭ privatj sciligi) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

Ameriko.

Usono.

Boston. La Boston'a Esperanto Societo kunvenis la 22 jan. por elekti la oficistaron por la venonta jaro. Oni elektis: s-o Georgio W. Lee, prez.; s-o H. B. Hastings, vicprez.; s-ino Mabel Mullan, sek.; f-ino Eugenie Öhman, kas.; direktilistaro s-o Rorman Frost (eksa redaktoro de Amerika Esperantisto), f-ino Marguerite Lowewell kaj s-o Roger Goodland. — La societo kunvenis ĉiun mardon en la ĉefsidejo n-o 807, Pierce Building, Copley Square, Boston, je 7.30 vespere.

New York. Esperanto Klubo por Virinoj estas fondita la 19 febr. La klubo estas organizita por reciproka profito kaj plezuro per Esperanto. Ĝia intenco estas ne nur profitigi la klubanojn per la uzo de nia lingvo, sed ankaŭ antaŭenigi Esperanton precipe inter virinoj. La klubo invitas korespondadon pri ĉiuj temoj de ĉiuj virinoj. Adreso: Women's Esperanto Club, Box 223, City Hall Station, New York City, U.S.A.

Eŭropo.

Aŭstrio.

Linz. Gojinde, la movado ekvivas. S-o Meisleder, polica inspektoro, gvidas neutralan kurson kun 70 lernantoj.

Grand-Britujo.

London. La movado estas tre vigla kaj niaj samideanoj jam ekprenas pri subĉielaj publikaj paroladoj. La membroj de Londona Klubo ĉiusemajne kunvenas kaj partoprenas en tre variaj programoj. La 14 marto geklubanoj aŭskultis al trege interesaj paroladoj de du eksterlandanoj s-o Crago el Auckland (Nov-Zelando) kaj s-o Roscoe el Japanujo.

Depost lasta septembro okazis kelkaj bonaj paroladoj kaj diskutadoj ĉe la nova Laborista Klubo. La refreŝiĝoj, teo kaj manĝaĵoj haveblaj dum la vesperoj estas bonege zorgataj kaj jam estas insitucio. La klubanoj kunvenas ĉiun sabatvesperon.

La kantado estas unu el la allogoj de „Dimanĉa Rondo“ krome la temanoj, interbabilado kaj la liberaj diskutadoj estas multe ŝatataj.

Krom la kursoj en la publikaj vesperaj lernejoj ĉiuj suprenomitaj grupoj havas kursojn.

La lasta tago por enskriboj por provi la ekzamenon de la „Londona Ĉambro de Komerc“ estas la 31 marto. Ekzameno okazos 3 junio.

Sendube allandaj samideanoj vizitos Londonon dum nuna jaro por viziti la Britan Imperian Ekspozicion — vizitante ne forgesu ĉesiti la grupojn. Londona Klubo ĉiusemajne je 7 h., Laborista Klubo ĉiusemajne je 6.30 h. Dimanĉa Rondo ĉiudimanche je 3.30 h. Informoj donas volonte kontraŭ respond-karto s-o E. Yelland, 3, Fonhill Road, Finsbury Park, Londono N.4.

Torquay. La 12 marto ĉe bonekonata hotelo Roslin Hall s-o W. R. Wood de la Torquay'a Esp. Grupo faris paroladon „Esp. kaj kelkaj impresoj de internacia kongreso“. La lekcio estis ilustrata per multaj lumbildoj, plejparte fabrikitaĵoj de la parolanto el fotografaj faritaĵoj dum la Dekkvina.

Ĉeĥoslovakio.

Karlshad. La 26 jan. parolis en la instruista akademio faklistro Hans Fischbach pri Esperanto. Ĉeestis ĉ. 100 instruistoj.

Olomouc. La esperanta societo okazigis la 6. 3. ĝeneralan kunvenon en restoracio Štěpánek. La nova komitato: prez. A. Kudela, sek. F. Hochman, kas. J. Šterba, komit. A. Eisler, J. Masný, A. Neuzil, E. Wolf, vickom. L. Augustynová, J. Morav; reviz. Blázek l., Stánel J. — La 2 marto ĉeestis 24 ges-anoj la radiotelefonan koncerton kaj paroladon de s-o Piliř, Praha pri Frideriko Smetana, kiu estis bone aŭdebla.

Regiona kunveno de nordmoraviaj esperantistoj okazos la 6 aprilo en Olomouc Y.M.C.A. Programo: antaŭtagmeze: laborkunveno kaj propaganda parolado; posttagmeze: muziko, lumbilda parolado en Esp. pri Konstantinopolo, recitaĵoj. Eventualajn dezirajn adresu al Esp. Societo Olomouc. (A. K.)

Germanujo.

Breslau. La 10. 3. okazis „Ekzameno pri kapableco“ por 24 lernantoj de 17 katolika knaba mezlernejo bone sukcesite. Prezidis Eklezia konsilisto Becker, gvidanto de la kurso estis rektoro Driesler. (W. Thielking.)

Freital-P. Okazis 5 marto infan-festo laŭ detala programo. Bona sukceso.

Leipzig. La 4 marto aranĝis la Esp. fakto de Leipzig Specimena Foiro internacian kunvenon. La ĉambro kaj apudĉambro estis plenaj. S-o Prof. D-o Dietterle sperte esiris; interesaj paroladoj plenigis la vesperon.

En ĉiuj urbkvarteroj, en preskaŭ ĉiuj strajtoj oni povas vidi afiŝojn pri Esperanto, la dua lingvo de ĉiuj popoloj. Ili estas varbiloj por la nun komencantaj kursoj de la Laborista Esp. Societo kaj de la loka delegitaro de UEA.

En la Esp. Societo Leipzig la kunveno nun pli multnombra estas vizitita kaj la Esp. Junularo Leipzig estonte kunvenos regule la 1-an kaj 3-an sabaton de ĉiu monato, je la 4 h. en Jugendheim, Töpferstr. 2.

Ottweiler (Saar-teritorio). La loka grupo esperantista aranĝis propagandan kunvenon por komenciĝi novan kurson. Parolanto estis s-o Omior (St. Ingbert) 10 pers. aliĝis al kurso sub gvidado de s-o Gerlach (Neunkirchen). (N. D.)

Hungarujo.

La UEA-jarfesto en Budapest.

La 29 febr. vespere okazis en la Socia Muzeo de Budapest sukcesa, sed modesta kunveno kaj festo por UEA. Kiel prologo s-ano Balányi deklamis la Kanton de Ligo tradukitan de Zamenhof, poste Stefano Nagy Molnár, vicprezidanto de la Hungara Esp. Societo, salutis la ĉeestantojn, klarigis la multflankajn servojn, meritojn kaj funkciojn de UEA kaj alvokis aliĝi al nia oficiala mondorganizo. S-o Prof. Rakusz laŭgatis alvokon de Edmond Privat, D-o Leono Lóránd deklamis poemon de Zamenhof „Al la fratinoj“. Sekvis la raporto de ĉefdelegito Balkányi, delegito por Budapest. Kvankam en lasta jaro laboro, sen vicdelegito, sukcesis al li plenumi la servojn de vojaĝaj, komercj, informaj, respondaj aferoj. Li deklaris, ke neniu povas esti konsiderata kiel esperantisto, se ne okazis la minimuma devo: aliĝo al UEA. Laŭ propono de s-o Nagy Molnár, D-o Jozefo Takács, ĉefsekretario de la societo, estis unuocle elektata por vicdelegito de Budapest. D-o Takács per kelkaj vortoj dankis la elekton. S-ano Toische deklamis poemon de Geiger pri Filo de Esperantujo. Ĉefdelegito Balkányi kaj D-o Takács laŭlegis el Ora Libro de UEA la plej gravajn alvokojn. Post deklamo de originala poemo de la poeto Kalocsay s-o Nagy Molnár fermis la festan kunvenon. UEA havas en Hungarlando nun pli ol cent membrojn; ĉi tiu nombro estas pli granda ol la samnombra membronombro en antaŭaj jaroj.

Italujo.

Torino. Vizitiis la „Esperanta Torino Asocio“ s-ano Karl Otto Sikor, komercisto el Vien, akompanita de la del. de UEA, s-o ing. De Balzac, en la nova kunveno ĉe la Komerca Rondo „Esperia“ (Via Arcevisurro n-o 1A). S-o Sikor donis al la ĉeestantoj tre interesajn informojn pri la XVI-a Universala Kongreso, kiun multaj torinanoj partoprenos.

— En la fervoja profesia lernejo okazis la fermo de dua kurso por fervojistoj; baldaŭ nova kurso okazos.

— Komitato por la IX-a Nacia Kongreso havis novajn sukcesojn pri sia laboro de organizo, inter la torinaj aŭtoritatoj.

— Same kiel dum la pasinta jaro la „Esperanta Fervojista Unio“ alfermis novajn kursojn por gefervojistoj. La lernado okazas en la „Fervojista Lernejo“ lokita en la Centra Stacidomo de Torino P.N. (Via Sacchi 5).

Jugoslavio.

Beograd. La 17 febr. faris publikan bonsukcesan paroladon en la gimnazio prez. de Beograda Esp. Societo, inspektoro de Financa Ministerio s-o Klajić. La 19-an de la sama monato komenciĝis nova kurso kun 60 partoprenantoj gvidata de li.

Bregi apud Koprivnica. Post la sukcesa gvidado de la kurso, gvidita de s-o Puhalo, fondiĝis ĉi tie malgranda Esp. Klubo. Elektita estas provizora estraro konsistanta el jenaj personoj: prez. I. Puhalo, vicprez. S. Sinjerc, sek. Ljubica Parić (instruistino), kas. F. Matišić, bibl. F. Peričević, komit. R. Štimac, I. Varga, M. Šiletić, K. Krapinec.

Klubo intencas aranĝi amuzvesperon. Nova kurso baldaŭ komencos.

Gjurgjevac. Ĉi tie komencis esp. kurso. Gvidanto s-o Matija Krog. Prez. de Sudsl. Esp. Ligo D-o Maruzzi estas invitita veni ĉi tien por fari paroladon.

Koprivnica. Dank' al la propagando de nia s-ano Muzinić, ekestis en la urbo grandega intereso por nia lingvo. De Zegreba Esp. Societo sek. Rotvić la 10 februaro faris paroladon por gestudentoj de la gimnazio. La 17 febr. parolis prez. de Sudsl. Esp. Ligo D-o Maruzzi nur por ĝurbanoj. Krom tio estis aranĝata ekspozicieto de esp. gazeto. Enskribiĝis 120 personoj por la kursoj gvidataj de direktoro de la gimnazio s-o Ivan Stemberger. Oni preparas fondon de nova klubo. La laboron gvidas s-o direktoro Prof. Kuntić.

Latvio.

Jelgava. Fondiĝis ĉi estas laŭleĝe registrita Esperanta Societo de Zemgalo. La nuna adreso de la societo estas tiu de la loka delegito: K. Strazde, Jelgava, Zala iela n-o. 15. — Samtempe en Jelgava okazis ankaŭ alia fondiĝo. S-anoj R. Eichenbaums kaj K. Strazde fondis „Esperantan Servon“, kiu celas disvastigi de Esperanto en Latvio per privata perpoŝta instruado. „Esp. Servo“ jam eldonis sian prospekton pri specialaj perpoŝtaj lecionoj de Esperanto, esperanta literaturo, UEA kaj ĉefaj esperantaj gazetoj. La adreso estas tiu de la delegito. (K.S.)

Litovio.

Biržai. La 26 febr. ĉi tie ĉe loka gimnazio estas malfermitaj kursoj de Esp. Vizitas kursojn pli ol 70 pers. plejmulte gimnazianoj de superaj klasoj. Kursojn gvidas s-o Liudas Alseika.

Mariampole. La ĉi tiea Mariampole'a Societo Esp. jam ekzistas 2 jarojn. En komenco de 1923 ĝi estis reorganiza kaj ĝia administrataro estis elektita: s-o A. Prapulenis prez., s-o I. Volšovsk, s-ino L. Chidekel kas. Adreso de societo: Mariampole'a Societo Esperantista, Litovio, Mariampole, postrestante.

Rokiškis. En ĉi-loka gimnazio la 12 jan. fondiĝis sekcio de esp-istoj konsistanta el 36 ĝeneralitoj. Leciono de Esp. okazas ĉiusemajne. Oni elektis estraron jenan: J. Ziuriys prez., J. Zove sek., A. Kuzavinis kas. Lastempe oni aperigas ŝapirografitan gazeton „Juna Esperantisto“. Fervora s-ano, s-o Ozelis-Kaziauskas donacis al gimnazia biblioteko por aranĝo de Internac sekcio multajn legolibrojn esperantajn. (A. P.)

Polujo.

Warszawa. „Akademia Esperantista Rondo“ aranĝis tie ĉi „Esperantan Vesperon“. Ĉeestis ĉ. 200 personoj, inter aliaj s-inoj Zamenhof, s-oj Belmont, Lotto, ing. Tajchewald, Wiesenfeld k. a. malnovaj esp-istoj. S-o Belmont legis referaton: „Esperanto kaj superstio“. Poste s-ino Cense per belega alparolo malfermis la ekspozicion de tiumonda esperanta literaturo. La vespero finiĝis per koncerta parto. — La esp. kurso, kiun aranĝis AER, havas grandan sukceson. Post „Esperanta Vespero“ oni malfervis novan komencan grupon kun 50 partoprenantoj; gvidas Kof. Folman. (I. Wizenberg.)

Portugalujo.

Lisboa. La malnova laborista societo „Lisbona Verda Stelo“ ĵus kunfondiĝis kun „Popola Esperantista Klubo“. El tio naskiĝis nova societo „Nova Vojo“; adr: Rua do Mundo, 81, 2-o. La movado nun revigligas, sekve de ĝia laboro prespartanta.

Rusujo.

Astrahanj. 19. 2. ekfunkciis nova (oka) esp. rondeto ĉe la lernejo komerca. 1. 2. ekfunkciis nova esp. rondeto (nauja) ĉe la klubo „Krasnij Vostok“ (Ruĝa Oriento), ĝv. de s-ano Faiko Bahter. 2. 2. estis ĝenerala kunveno de astrahanaj gesamideanoj. 5. 3. post resaniĝo de s-ano N. Stepanov esp. rondeto ĉe la Trama Oficejo refunkcias. 6. 3. s-ano S. Sarišev gvidas praktikajn kursojn ĉe la klubo de 5 oktobro por prepari esp. instruistojn.

Totjma. Manskribita gazeto „Verda Bruo“ eldonita de lernanto de loka Arbara Lernejo (Lesnaja Skola) aperigis kelkajn artikolojn iradukitajn el n-oj 176—178 de ET de s-o Riŝkov-Makeev. Oni intencas daŭrigi tion. (Romov.)

Internacia Kristana Kongreso.

De la 3—10 aŭgusto 1924 okazos en Soesterberg, Nederlando, internacia kongreso de la Liberala Kristana Junula Ligo. La prezidanto de la nederlanda ligo principe konsentis aliassi Esperanton kaj inviti esperantistojn por paroli mallonge en Esperanto, se sufiĉe granda nombro da esperantistoj petas tion.

Samideanoj, vizitu du la kongreson kaj, se vi ne povas tien iri, skribu al la prezidanto s-o J. de Koning, Zocherstraat 79, Amsterdam por subteni nian peton, ankaŭ akcepti Esperanton kiel kongreslingvon.

Julia Isbrucker, s'fage.

Radio-gazeto en Esperanto.

La peresperanta kaj povesperanta organizaĵo „Radio-Servo“, Locarno (Svislando), fondita en pasinta jaro sekve de la Esperanto-Konferenco de Venezia de grupo da svisaj, italaj kaj allandaj samideanoj kaj esperanto-amikaj radio-fakuloj, post longaj preparoj nun publikigas sian anoncitan organon „Radio-Servo“.

La Internacia Radio-Revuo „Radio-Servo“, ekaperanta je la fino de ĉi tiu ĉi monato, presata en la Esperanto-presejo de nia samideano s-o Borel en Berlin, havas la specialan celon, propagandi la nuran uzon de Esperanto kiel internacian radio-lingvon kaj kontraŭbatali la danĝerajn malamikojn de Esperanto.

La Internacia Radio-Revuo „Radio-Servo“ estas publikigota ĉiunmonate en tutgranda tag-gazeta formato, ilustrita, ok-paĝa en du apartaj po-kvarpaĝaj partoj:

- I. ĉefa parto kvar-paĝa nur esperantolingva;
 - II. aldona parto kvar-paĝa diverslingva, — por tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenas Esperanton por esperantistigi ilin kaj por montri la taŭgecon kaj la senkonkurencan monopolon, kiun posedas Esperanto kiel internacia radio-lingvo.
- La „Radio-Servo“ invitas la samideanojn en ĉiuj landoj kunlabori kun ĝi, por esperantistigi la radiistojn. La gazeto laboras en konekto kun la ĵus fondita Internacia Radio Asocio.
- Sendu vian adreson kaj aliĝon al „Radio-Servo“, Locarno (Svislando).

Por granda Esperanto ekspozicio la 29 junio en Königsberg Pr.

okaze de laborista kulturtago estas bezonata materialo pri Esperanto en komerc, foiroj, korespondado, gazetoj kaj literaturo. Firmoj, foiroj, unuigoj, redakcioj kaj izoluloj en ĉiuj landoj estas petataj liveri:

1. ne resendotan materialon tuj
 2. resendotan en junio (jam nun anoncanta ĝin).
- Kawelitzke, prez. de Esperanta Laborista Grupo Königsberg Pr. (Germanujo) Domnauerstr. 39, (Rosenau).

Al hodiaŭ numero estas aldona la mara „Internacia Komerc“.

Hipoteko urĝe serĉata

de 1000-3000 germ. or-mk.

je unufamilia vilaĝa vilaeto apud Leipzig. Senŝulda. Antaŭmilita aĉetosumo 15000 germ or-mk. Registrigo en alia bona valuto. Altaj interezoj! Fidinda kaj sekura afero. - Peŭi detalojn de l' posed-anto

D-o Walter Döhler, Riesa (Germanl.).

Membroj en pli ol 40 landoj

Unua klubo por interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr., papermonon ktp. kaj por korespondado kun la tuta mondo. Postula inspekto kontraŭ respond-kuponono de s-o

Fr. Jakobi,
Bahnhofstrasse 29
Coblentz - Germanujo

Kio estas S.A.T.

- S.A.T.** estas organizaĵo celanta meti Esp. je la servo de la proletaro tutmonda
- S.A.T.** estas peresperanta aparato neniel politika
- S.A.T.** kvankam utileca laboristoserva, estas samtempe alideala: ĝi celas krei ĉe siaj membroj sennacian spiritoŝtaton.
- Kiajn organojn havas S.A.T. por plenumi tian taskon?**
- S.A.T.** eldonas por plenumi tian taskon monatan revuon, ilustritan kun literatur-scienca adono: **„Sennacieca Revuo“** (Redakcio: 24 Boulevard Beaumarchais, Paris XI; Administracio: Colmarstr. 111, Leipzig-Süd., Germanujo)
- S.A.T.** eldonas per sia Eldonkooperativo gravajn verkojn el kiuj „Faŭsto“ de Goethe kaj „Eklumo en Abismon“ de H. Barbuss estas jam aperintaj
- S.A.T.** eldonas Jarlibron, entenanta la adresojn de sia membraro, statistikon pri la laborista movado en la mondo kaj plej diversajn sciindaĵojn.
- Kion jam faris S.A.T.?**
- S.A.T.** okazigis 3 kongresojn, kies lasta estis honore prezidata de la fama scienculo A. Einstein
- S.A.T.** vekis ĉe la esp. laboristaro grandan intereson, veran entuziasmon kaj per tio certigas la sukceson de Esp. en proletaraj rondo.
- S.A.T.** estas lege enregistrita en Francujo. Detalojn oni petu skribante al la sidejo. Adreso: Sennacieca Asocio Tutmonda, 25 rue Boyer, Paris XX.

Forster 1 1/2 Ĉ. P. Motorbiciklo
Garantio: 12 monatoj Modelo 1924

1 cilindro, 2-takta, 140 kbcm, 2 transmisiiloj, liberado, kulpigo kaj oportuna rimen-streĉado, vetur-rapideco 10-60 km pohore, supreniro ĝis 20%. Esenc-konsumo ĉirkaŭ 1 litro da benzino kaj 1/2 oleo po 50 km.

Tuj liverable el provizejo.

Prospektoj (germane kaj france) kaj informoj senpage haveblaj de

Gebr. Forster, fabriko de Motorbicikloj
Hinwil (Zürich), Svlando.

Seriozaj pagokapablaj reprezentantoj serĉataj en la tuta mondo

Saĝaj sinjorinoj!

Atentu, se vi uzas rimedojn kontraŭ malhelpoj en la menstruacio! — Estu singardaj pro oferto, kiuj nur malofte plenumas tion, kion ili promesas! — Savaĵo kaj novan vivon oni atingas alportas mial de ĵardokaj provitoj s-o c i a l - r i m e d o j. Ili forigas malsanemajn ekhaltajn, kiuj povas puŝi vin al m a l - e s p e r o. — Ili ankaj helpas en malfacilaj statoj. Plej simpla uzo, garantiite sen malutilo. Neniu malhelpo al laboro. Multaj libervoloj kaj koraj dankletoj pravas la sukceson, konstateblan ofte jam post nur kelkaj h o r o j. Sendado diskrete per remburso. Ĉu vi suferas? Se jes, skribu ankoraŭ hodiaŭ al

Higiena entrepreno: W. Heilmann,
Bellealliancestr. 46, Hamburg 19/947.

AUSKUNFT MISSAMT FRANKFURT A.M.

6. BIS 12. APRIL

Internacia Foiro de Frankfurt a.M.
6—12 aprilo.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k.s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvalaj enpresoj, koston po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propra anonceto preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.—mk., prefere prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

NASKIĜO. Al ges-anoj Antonino kaj Petro Soroko, Leningrad, stacio Popovka, naskiĝis filo nomita Leo. (Ni gratulas. Red.) [1]

EDZIĜO. S-o Vojtěch Venský, membro de UEA, kun f-lino Anička Kuchařová. Koran gratulon. A. K. [1]

MORTO. Fine de februaro mortis en Riga edzino de esp-isto A. Urstín. [1]

FUNKCIOJ de korespondanto de eksterlandaj gazetoj povas plenumi studento de Varsovia Universitato. Bonvolu skribi al N. P. Maskilejon, Nowolipi 18, Warszawa, Polujo. [2]

ESPERANTAJ NOMOJ. Geedzoj Liudas kaj Marie Alseika el Biržai, Litovio, en majo atendas naskiĝanton idon. Ĉiujn afablajn gesamideanojn, kiuj scias belajn esperantaj nomoj, oni petas sciigi laŭ supra adreso. Kun antaŭdanko ĉiuj ricevos respondon, kaj kies proponita nomo estos elektita, tiun il ĉi intencas afable inviti por ilia ido esti atestanto-protektanto (baptopatro). [2]

EN KIU ESPERANTISTA FAMILIO juna germanino povos paŝigi kelkajn semajnojn en printempo (kiel paganta gasto) por refreŝigi la nervojn, malfortigitajn de la profesia laboro kaj malbona nutrado dum la lastaj jaroj? Skribiĵojn kun prezo bonvolu direkti al f-lino Anna Hempel, Waldstr. 8, Cöpenick b. Berlin, Germ. [2]

LA ESPERANTISTA KLUBO DE AMAL, Svedujo, aranĝas poŝtkart- kaj lertervesperon la 20 aprilo. Ĉiujn skribiĵojn ni respondos. Adresu al Reinhold Larsson, Kyrkogat 115, Amål, Svedujo. (Signu la skribiĵojn L.V.) [2]

KIU POVAS havigi al mi la unuan numeron de „Literatura Mondo“ (oktobro 1922), kaj „La Revuo“ n-ojn 87—94, bonvolu fari proponojn al mi. Fr. Schoofs, direktoro de „Belga Esperantisto“, Kl, Hondstraat 11, Antwerpen, Belgiujo. [2]

21-jara KOMERCISTO kun 1-jara praktiko, serĉas postenon en Germanujo aŭ eksterlande. Mi konsas Esperanton, anglan, francan kaj hispanan lingvojn, krome librotendon, korespondadon kaj masinkribadon. Ofertojn al Peter Andresen, Fiensburg, Katharinenstr. 7, Germ. [2]

AL LA MARO! Du junaj esperantistoj 25-jaraj, arĥitekto kaj komercisto, deziregas paŝigi la someran liberiempon de 8 tagoj ĉe gastemaj gesamideanoj en beleta loko apud la maro indiferente en kiu eŭropa lando. Event. ili rekomence gastigus 2 esperantistojn en bela nordbohema urbo kun interesa montara ĉirkaŭaĵo. Proponoj estas petataj al s-o F. Michalcz, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 120, Ĉeĥos. [2]

ATENTU! SAMIDEANOJ! Kredit-kuponono por afrankita liveraĵo kontraŭ sendo de la anonco kaj antaŭa pago. Tiel juĝas mial konsumantoj: S-ino E. Schm. skribas laŭvorte: Via specimeno liverigis mialjn parencojn kaj min de la plej grandaj zorgoj de l' taga vivo. Mi faras kaj felice kaj povas uzi la grandajn elasezojn por la familio; koran dankon. Precipe la virino devus interesiĝi pri ĝi; sed bedaŭrinde ĝi estas konata tro malmulte. Mi bedaŭras ĉi un. kiu ankoraŭ ne trovis vian adreson. Por konatoj bonvolu sendi ankoraŭ 5 ekz.

S-o D-o E. B. juĝas: Mi atentigas al la kvalito de viaj Desinfektaj Tabletoj en ĉiuj al mi konataj kaj konvenaj kazoj.

S-o kapitano T. skribas: Mi povas certigi vin, ke viaj Desinf. Tab. en preskaŭ 5-jara uzado tute plenumis ĉiujn pretendojn.

Mi posedas pli multe ol mil dankskribiĵojn! Ĉiu pensanta familio postulu tuj specimenojn kontraŭ 3 s. fk. (Germanujo 2 or-mk.) aĉi detalan esp. prospekton kontraŭ unu resp.-kup. Kiu provos, tiu laŭdos! Adreso: Otto Hierer, Nürnberg, Bavarujo, Schleifweg 55, poŝteke-kvito 15255. [2]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Filatelistroj atentu! Mi vendas 4 PM el Suahelio (Zanzibaro) el jaro 1896. Pro prezo oni skribu al s-o E. Höhne, instruisto, Apolda, Germanujo. [2]

S-o Franz Levy, Zimmerstr. 4a, Breslau 5, Germanujo, deziras korespondadi kaj interŝanĝi PM kaj gazetojn (Esperanto, sporto kaj politiko) kun la tuta mondo. Mi tuj respondos. [2]

S-o John Van der Rieten, St. Jobstr. 26, Antwerpen, Belgiujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj; interŝanĝas PM. [2]

S-o Remi Paternoster, Staatsnormaalschool 8, Gent, Belgiujo, deziras interŝanĝi PM, papermonon, PK kaj portretojn. [2]

Belga samideanoj deziras interŝanĝi PM. Sendu nur nedifektitan. Ne sendas unue. S-ino R. Gallis, 27 Berthouthstraat, Berchem (Antwerpen), Belgiujo. [2]

S-o H. Agevik, Tre Liljorsplan 5, 1 tr. h., Stockholm, Svedujo, deziras interŝanĝi il. PK kun gesamideanoj de la tuta mondo. [2]

Intencas vojaĝi al Mulhouse, Francujo, tial mi deziras korespondi kun tieaj kaj gesamideanoj tutmonde. Nepre respondos. Rudolf Gröbning, Lankovitz 101, Sibirio, Aŭstrio. [2]

Korespondadon per il. PK kaj L kun ĉiulandaj gesamideanoj deziras s-o Karl Hachmann, Mittelweg 40, Cieve (Rhld.), Germanujo. Respondos al ĉiuj. [2]

Mi deziras korespondi kun fratinojn en aĝo de 50—40 jaroj de la tuta mondo per il. PK. Adreso: s-o Michael Schubert, Sarajevo, Koševo ul. 16, Jugoslavio. [2]

S-o A. Krome, horloĝisto, Solitudestr. 68/b, Ludwigsburg (Württbg.), Germanujo, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo per L kaj il. PK. [2]

S-o N. S. Riškov-Makeev, Toĵima de Volodga gub., Rusujo, korespondas kun ĉiuj landoj per il. PK kaj L kun personoj, kiuj klare skribas sian adreson, korekte afrankas, sufiĉe scias la lingvon, kaj ne kolektas po unu poŝtkarto de ĉiu anoncinto; ĉiam respondos, sed ne sendas unue. [2]

S-o Carlo Massocco, Salita S. Girolama 11—4, Genova, 6, Italujo, deziras interŝanĝi PM kun gesamideanoj de la tuta mondo. Preferas: Nederlandon, Belgiujo, Svislando, Hispanujo, Portugalujo, Saariterioroj, Memel, Danzig, Rusujo, Litovio kaj Estonio. [2]

S-o Vicente D. Bonetto, Morteros (F. C. C. A.), Argentino, deziras korespondi per il. PK kaj L kun ĉiulandanoj. Ĉiam respondos. [2]

F-lino Emma Wendrickx, 8 Quai des Charbonnages, Bruxelles, Belgiujo, deziras korespondi kun fratinojn 18—20 jara en Ameriko nur en angla lingvo. [2]

S-o F. La Gravière, 85 Rue St. Josse, Bruxelles, Belgiujo, deziras korespondi letere, nur en angla lingvo kun Ameriko. [2]

Kontraŭ 10 il. kartoĵoj uzitaj mi sendos 25 diversajn sov. PM. Ankaŭ interŝanĝi PM, krom Germanujo. Mi respondos ĉiam. Bazilo Averin, Poŝteko 14, Astrahaĵi, Rusujo. [2]

S-o Viktor Bonde, Stenslund 2, Falun, Svedujo, deziras gekorespondantojn por siaj en komenco de aprilo finiĝontaj kursoj. [2]

S-o Einar Adamson, redaktoro, Sveda Laborista Asocio, Göteborg 1, Svedujo, deziras korespondantojn por si mem kaj siaj lernantoj. Interŝanĝas il. PK kaj L, ankaŭ gazetojn, papermonojn kaj PM. [2]

S-o Max Jatzold, Neitzschkau i. Vogl. (Germ.), Bahnhofstr. 7, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj per il. PK kaj L. Ĉiam respondos. [2]

S-o Karl Beer, Grenzstr. 16, Nürnberg, Germanujo, deziras korespondi kun gesamideanoj, precipe eksterlandanoj per il. PK kaj L. [2]

50 glerantoj deziras korespondi kun la tuta mondo per L kaj PK. Adreso: Esperanto, Ecole Pigier, Place de la Banque, Perpignan, Francujo. [2]

Instruisto Richard Thiel en Kriesdorf apud Reichenberg, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per L kaj il. PK kun gesamideanoj de la tuta mondo, escepte Ĉeĥoslovakio, Germanujo kaj Aŭstrio. [2]

Kun ŝpinesistro deziras korespondi pri temoj de ŝpinado ktp. Heinrich Hauser, stud. text., Textilschule en Reichenberg, Ĉeĥos. [2]

S-oj Venzel Jäckel, Zastera kaj Ernst Rudolf en Kriesdorf ATE, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun gesamideanoj tutmonde (escepte Aŭstrio, Germanujo, Ĉeĥoslovakio) per il. PK kaj L. Nepre respondos. [2]

S-o Andrianasolo J. Laurent, instruisto, P. C. N. Ambohivanoro (Tananarivo), Madagaskaro, Afriko, deziras korespondi kun seriozaj gesamideanoj. Ĉiu ricevos respondon. Kolektas muzikotajn tutmondajn. L. P. I. Ankaŭ akceptos volonte franclingvajn proponojn por varbado. [2]

S-o Daniel Rasolo, lernanto de P. C. N. ĉe s-o A'solo J. Laurent, Ambohivanoro (Tananarivo) Madagaskaro, deziras korespondi kun samideanoj de tuta mondo por perfektigo. Nur serioza korespondado per L kaj PK il. [2]

Gesamideanoj! Pruva la tutmondan disvastiĝon de Esp. al mial 25 glerantoj 15—50-jaraj, per alsendo de il. PK kaj L el ĉiuj landoj, escepte Ĉeĥoslovakio, Germanujo, Aŭstrio, kun kiuj ni interlitas. Ĉiu ricevos respondon. Tion garantias F. Benisch, del. de UEA, Gymnasiumsg. 6, Mähr. Ostrau, Ĉeĥos., kiu disdonas la ricevitaĵojn skribiĵojn al sia lernantaro. Kelkaj kolektas PM. [2]

S-o Ilja Lazarov, gimnaziano en la 7. klaso, Gorna-Ŭumajio, Bulgarujo, deziras korespondi per il. PK kaj L kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. [2]

Maloftajn PM 5000 mk. Warburg, 10000 mk. katedralo de Köln, 12 div. litov. Memel-PM, ĉiuj por 0.50 dol. aŭ egalvaloro. Fritz Zyleit, Grabnick ĉe Lyck, Ostpr., Germ. [2]

S-o E. Höhne, instruisto, Apolda Germ., deziras interŝanĝon de PM kaj il. PK kun ĉiuj landoj. [2]

Du junaj studentoj, ĉe Mara Teknika Akademio, deziras interkorespondi esperante, france kaj bulgare per il. PK kaj L kun gesamideanoj de la tuta mondo pri teknikaj kaj elektroteknikaj aferoj; popolaj moroj kaj kulturo; literaturo kaj leatiro; interŝanĝo il. revuojn. Adreso: V. Najdenov kaj Iv. Bakargiev, Sir. Vajnska n-o 3, Varna, Bulgarujo. [1]

S-o Ludoviko Obrezián, Mezökövesd, Hungarujo, interŝanĝas il. pk. (bfl.). Nia popolomdo estas mond fama. Pm. po 50-100, ankaŭ seriojn, portretojn, gazetojn kpt. Ne sendas unue, sed certe respondos. [1]

S-o A. Faasse, Tamarindestr. 29, Utrecht, Nederlando, deziras korespondi per interesaj vidindaĵoj (prefere naturbildoj). Respondos akurate kaj petas legelblaj adresojn. [1]

F-lino Jadwiga Machnicka (polino), Poznań, Br. Zagórze 10, Polujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. PK kun interŝanĝo de fotografiaĵoj. Korespondas ankaŭ pole kaj germane. [1]

F-lino Gertruda Leszek, Poznań, Mostowa str. 5a, Polujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. PK. Korespondas pole kaj germane. [1]

Mi deziras korespondi kun la tuta mondo per il. PK. F-lino Gertruda Kubiakówna, str. Diuga 7, Poznań, Polujo [1]